

**LA IMPOSTISTO REVENIS AL SIA DOMO JUSTIGITA, MALE DE LA FARISEO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Luko 18, 9-14**

**En tiu tempo Jesuo diris ĉi tiun parabolon por kelkaj, kiuj sin taksis justuloj, malestimante la ceterajn.**

**Li diris: «Du homoj venis en la templon por preĝi: fariseo kaj impostisto.**

**La fariseo, starante, tiel preĝis en sia koro: “Dio, mi Vin dankas, ĉar mi ne estas kiel la ceteraj homoj ŝtelistoj, trompisto, malĉastaj, aŭ kiel tiu impostisto. Mi fastas dufoje en la semajno, kaj mi pagas dekonajojn el ĉio, kion mi gajnas”.**

**Sed la impostisto restis malantaŭe, kaj eĉ ne kuraĝis levi la okulojn al la ĉielo sed frapadis sian bruston, dirante: “Dio, kompatu al mi, pekulo!”.**

**“Mi diras al vi”, konkludis Jesuo, “ĉi tiu impostisto revenis al sia domo pravigita, male de la alia. Ĉar, ĉiu kiu sin altigas, estos humiligata; sed kiu sin humiligas, estos altigata”».**

“Estu sanktaj, ĉar mi estas sankta”, tiu estas la devigo, la peto de la Dio de la Malnova Testamento, kaj la sankteco estas komprenata kiel grimrado al Dio pere de la observo de reguloj, de preceptoj, de ordonoj, de religiaj praktikadoj.

Nu strange tiu invito neniam aperas el la buŝo de Jesuo. Neniam Jesuo en la evangelioj petas: "Estu sanktaj kiel mi estas sankta". Sed Jesuo insiste kaj daŭre invitas "Estu kompatemaj kiel via Patro estas kompatema". Kial ĉio tio? Tion klarigas al ni Luko per la parabolo kiun ni nun ekzamenas, ĉapitro 18, versikloj 9-14, kaj la evangeliisto vidigas al ni la malsaman orientiĝon.

En la sankteco la homo kiu grimpas al la sankteco, al Dio – la celpunkto estas Dio – ambicias porti la homojn al Dio. Sed tiuj kiuj deziras porti la homojn al Dio neeviteble agas tiel ke kelkaj postrestas, aliaj estas ekskluditaj. Jen, la novaĵo de Jesuo estis ke li ne volis porti la homojn al Dio, la grimpadon al sankteco, sed li faris ion alian: li portis Dion al la homoj kaj se en la grimpado al la sankteco la homo iras direkte al Dio dank' al siaj meritoj (sed ne ĉiuj povas aŭ volas havi tiujn meritojn), en la fakto ke Jesuo portas Dion al la homoj, tio kio gravas ne estas la merito de la personoj, sed la amdonaco de Dio por la tuta homaro.

Iu Dio kiu ne amas la personojn malgraŭ iliaj pekoj, sed ĝuste pro tiuj li ilin amas. Tiu estas la revolucia novaĵo kiun Jesuo alportis. Kaj Jesuo ĝin surscenigas per tiu ĉi parabolo konata kiel tiu de la "Fariseo kaj impostisto", kiu havas tre precizan komencan indikon. La evangeliisto skribas ke *Jesuo diris ĉi tiun parabolon por kelkaj, kiuj sin taksis justuloj*, - kie justuloj signifas "kvitaj kun Dio" - *malestimante la ceterajn*.

Kaj li prezentas la antipodojn de la Izraela socio, la Sanktulon antonomazie, la Fariseon, la personon kiu, kiel diras la nomo (Fariseo signifas disigita), disiĝas de la aliaj per la religia praktikado, la observoj, eĉ maniaj, kaj la personon juĝatan la plej malpuran, la plej foran de Dio, la impostiston, individuon kiu, eĉ se li tion volus, ne plu povas ŝanĝi tiun laboron kiu igas lin malpura.

Nu la Fariseo en tiu preĝo dankas Dion pli por si ol por la aliaj kaj kion li prezentas al la Sinjoro? Li prezentas al la Sinjoro tiujn kiuj estas liaj klopodoj atingi lin per la religiaj praktikadoj pli ol la aliaj. Diras la Fariseo: "*Mi fastas dufoje en la semajno*", sed la deviga fasto estis petata unu nuran fojon jare. Ne, li faras plie, li fastas ĉiujn semajnojn eĉ dufoje.

Kaj poste li sin fieras: "*mi pagas dekonajojn*" la dekonajoj estas la ofero de dekuma parto de la rikolto kaj de la brutaro al la templo, al la Sinjoro, "*el ĉio, kion mi gajnas*." Li ne pagas nur ĉion kio estas deviga, sed li pagas por ĉio kion li posedas.

Li do estas persono kiu klopodas alveni al Dio pere de senĉesa kaj daŭra praktikado, kaj kiel ni vidos superverŝiganta, de la obsevoj kiujn Dio neniam postulis. Ĉar Dio neniam petis tiujn aferojn, Dio jam per la profetoj estis dirinta: *"Lernu kion signifas Kompaton mi volas kaj ne oferojn"*.

Nu tiu homo kiu volas iri al Dio kaj ambicias alporti homojn al Dio trovas sin ekskludita. Kial? Diras Jesuo ke de malproksime estis impostisto, la persono enmergita ĝiskole en la pekoj, kiu ankaŭ kuraĝas eldiri tiun ĉi preĝon: *"Dio, kompatu al mi, pekulo!"* uzante la imperativan verbon. Nome li al Li diras: *"Estu bonvolema, montru al mi vian kompaton"*.

Ni havas do, unuflanke la spiritan personon, riĉan je sia sankteco, kiu proponas siajn meritojn al la Sinjoro, aliflanke la personon kiu havas nenion por prezenti, escepte de sia kondiĉo de pekulo, el kiu, mi ripetas, li ne plu povas elveni kaj montras sian mizeron.

Unuflanke la merito, aliflanke la bezono. Nu la revolucia, konsterna sentenco de Jesuo: *"Mi diras al vi: ĉi tiu impostisto revenis al sia domo pravigita, male de la alia."* Memoru ke en la komenco Jesuo estis dirinta ke la parabolo estis por kelkaj kiuj havis la intiman sintrotakson esti justuloj kaj malestimis la aliajn. Kaj li prezentis la justulon, la fariseon, kaj la malestimitan. Nun la destinoj renversiĝas.

La malestimata impostisto iĝas ĉi tie justulo. *"Revenis al sia domo pravigita"*, kio signifas kvita kun Dio, dum la alia ne. Tio kion Jesuo prezentis estas novaĵo kiun eble ankoraŭ ni ne sukcesas kompreni sed kiu devas nin puŝi al tiu devigo: La Sinjoro ne petas ke ni estu sanktaj, ĉar la sankteco disigas de la aliaj, eble ĝi alproksimigos al Dio, sed neeviteble malproksimigas de la aliaj personoj (la sankteco komprenata kiel observo de reguloj, de religiaj praktikadoj). Jesuo petas de ni esti la kompatema kareso de la Patro por ĉiu kreitaĵo; ne ami la alian por liaj meritoj, sed por liaj bezonoj.

Ĉi tiu estas la instruado de la bona novaĵo de Jesuo.